



« LE GROUPE ESPERANTO DU MAINE » SALUTAS VIN !



Bonvenigaj vortoj

*Libera homo, al vi eterne estos
kara la mar' (Ch. BaudeLaire)*

Enhavo

- Sarta historio pri esperanto
- Kio nova en nia retejo ?
- Lokaj aktualaĵoj: La Noktoj de la legado 2023

Sarta historio pri Esperanto

Marie Marvingt 1875-1963



« Stadiono Marie MARVINGT » en la urbo Le Mans

En Julio 2022 la mansa estraro nomis sian grandan stadionon « Marie Marvingt » omaĝe al la sportemaj virinoj kaj prezentis ĝian logotipon en januaro 2023.

« Aleo Marie MARVINGT » en la urbo Laval

Ekde 2019, iu aleo en la kvartalo « Pommeraies » nomiĝas « Aleo Marie Marvingt ». Tiu virino, pioniro de aviado kaj eminenta sportisto, kuraĝe distingiĝis dum la unua Mondmilito.

La Noktoj de la Legado Januaro 2023


Kiel kutime, nia grupo partoprenis tiun nokton...
kies temo estis la TIMO...

Kiu estis Marie Marvingt ?

La fianĉino de danĝero

Parolante pri Marie Marvingt, ofte aperas la epiteto "Unua virino kiu...". Ĝi karakterizas la longan liston de ŝiaj heroaĵoj. Danke al la komunumo « le Mans métropole », ŝi denove estas la "Unua virino kiu..." donas sian nomon al granda stadiono kun pli ol 20 000 sidlokoj. Ĉi tiu pioniro tiel daŭre elstaras en la sporthistorio kaj inspiras estontajn generaciojn.

Ekstrakto de la bulteno : « Le Mans Métropole », n° 255, januaro 2023.



Marie Félicie Marvingt 1875 – 1963

Ŝi estis alinomata « la Fianĉino de danĝero » kromnomo kiu substrekis la temperamenton de Marie Félicie Marvingt.

Naskiĝinta en la urbo Aurillac (Franca departemento Cantal) en 1875, ŝi estis incita al multaj sportoj ekde sia junaĝo, interalie al cirkartoj, naĝado, biciklado pri kiuj ŝi brilis.

Ŝi ankaŭ elstaris en alpismo, kaj en 1905 iĝis la unua virino kiu surgrimpis la malfacilajn montopintojn de « Grépon » kaj de « Grand Chamoz » de la Francaj Alpoj.



La unua biciklantino de la « Ĉirkaŭiro de Francio »

Marie Marvingt iĝis ankaŭ la unua virino neoficiale fin-biciklanta la konkurson « Ĉirkaŭiro de Francio » en 1908, spite la malpermeson partopreni kaj ekirante post la viroj.



Alivestita kiel viro por defendi sian landon

Kuraĝa, ŝi volis ĉeesti en la milit-fronto kiel soldato por defendi Francion dum la unua mond-milito sed tion Armeo malpermesis al ŝi.

Tamen tio signifis forgesi ŝian obstinan karakteron. Alivestinte sin kiel viro ŝi sukcesis antaŭ ol esti senmaskigita post 47 tagoj kaj resendita hejmen.

La juna virino sekvis ankaŭ kursojn pri medicino kaj diplomiĝis kiel flegisto.

Ŝi praktikis dum la dua mond-milito, estante samtempe raportisto.

Ŝi havis la ideon krei Aer-ambulancon kaj organizis la unuan grupon de flegistinoj transportatan per avio al la fronto, projekto kiu poste fariĝis internacia kaj ŝi inaŭguris tutmondan sanitaran aviadon en 1956.

Pioniro de aviado

Precipe kiel pioniro Marie Marvingt markis sian epokon.

Ŝi estis unu el la unuaj vironoj kiu flugis sola.

En 1909 per la libera aerostato « Etoile Filante » (falstelo) ŝi estis la unua homo kiu transflugis la Nordan Maron ĝis Anglujo*.

Estis prodaĵo kiu daŭris 14 horojn kaj duonon. Poste en 1910 ŝi havigis sian licencon pri pilot-avio kaj oftigis flugojn.



Virino la plej ordenita en Francio,

Ŝi elstaris en ĉiuj sportoj : skiado, glitkurado... kaj en 1910 ŝi ricevis la oran medalon pro la tutaj fakoj de la Sporta Akademio.

Nenio haltigis ŝin. 84 jaraĝa ŝi trapasis licencon pri pilot -helikoptero.

Nun ŝi plu estas la plej ordenita virino el la franca historio kun 34 medaloj kaj titoloj, inkluzive la Honora Legio.

Ŝi forpasis 88 jaraĝa en 1963, en la urbo Laxou apud la urbo Nancy.

Ekstraordinara vivo !

*La antaŭa tia provo estis tiu malsukcesa de Pilatre de Rozier kiu ĝin pagis per sia vivo en 1785.



Marie Marvingt en la urbo « le Mans » en 1928

Ŝi estis invitata de la Franca Aeronautika Ligo por prelegi en la « Palace-cinéma » en « le Mans ». Ŝia alveno, lundon la 4-an de junio 1928 estis la temo de laŭdaj artikoloj en la loka gazetaro. Tiam gazeto « Ouest Eclair » ĉeftitolis : *la unua sportistino de la mondo en Le Mans !* Loĝantoj alvenis multnombraj por aŭskulti ŝin.

Marie Marvingt kaj Esperanto

Laŭ diversaj fontoj Marie Marvingt parolis almenaŭ kvin lingvojn inter kiujn la lingvo Esperanto.

Ŝi estis allogita al Esperanto sekve de prelego de Carlo Bourlet, prezidanto de la Pariza esperantista grupo.

Ŝi eklernis ĝin komence de januaro 1903 kiam ŝi estis 28 jaraĝa kadre de la « Touring Club de France ». Ŝia diplomo « Attesto pri lernado » datumas de la 15-a de aprilo samjare.


Kvankam ni ne retrovis multan agadon fare de ŝi por disvastigi Esperanton, Marie Marvingt restis kore ligita al Esperanto. Ĝis sia antaŭlasta vivjaro ŝi partoprenis en Esperanto-kunveno, eĉ se pasive (ŝi estis 87 jaraĝa), en la bierejo « Excelsior » de la franca urbo Nancy.

En la jaro 1955, aperis tri paĝa artikolo en la bela esperantista revuo « La Praktiko ».


« *La franca Esperantistino Marie MARVINGT la plej eksterordinara virino post Jeanne d'Arc* » Estas la Usonaj ĵurnalistoj kiuj donis tiun titolon al nia samurbanino Signorino Marvingt en tre dokumentita artikolo kiu aperis en *The World Veteran*, artikolo esperantigita de S-ro Jacques Boetsch por la decembra numero de *La Praktiko*. (1956, la Informilo, Nancy).

Tiu S-ro Boetsch skribis ankaŭ: *Ŝi estis konvinkita, ke la mondo devas enkonduki komunan internacian lingvon. Kiam ŝi la unuan fojon aŭdis pri Esperanto ŝi tuj kun entuziasmo ellernis tiun lingvon kaj de tiam fervore praktikas kaj disvastigas ĝin.*

Foto el La revuo Movado (n-ro 48, Januaro 1914) montris ŝin antaŭ ŝia foriro en sfera balono, dum festoj donitaj en Chalon-sur-Saône : *“Ŝi tenas en mano esperantistan flagegon, kiun donis al ŝi S-ro Richard, la sindonema prezidanto de la Esperantista grupo en Chalon-sur-Saône, kaj kiun ŝi alprenis kiel aeronautikan flagegon.”*



La Informilo, Nancy, 1956, Muzeo Gray, Francio



Fontoj

Vikipedio, Marie MARVINGT

Henri Masson, 7 novembre 2018 : <http://www.ipernity.com/blog/32112/1049553>

Muzeo Gray

Esperanto info, n° 151, Nov- dec 2021

Le Mans Métropole, n°255, januaro 2023

LA NOKTO DE LA LEGADO 2023

Kiel kutime la GEM partoprenis al nacia evento « **la Noktoj de la Legado** » en la Universitato du Maine, la 19-an de Januaro 2023

Tiujare la noktoj temis pri LA TIMO, do ni elektis tekston el « Nokta flugado » de Saint-Exupery.

Ni legis ĝin laŭvoce cele ke la publiko divenu ĝian titolon.

Jen kion ni proponis en esperanta lingvo, kaj sekvis dialogo en la franca

« Aer-kirlo plonĝigis la aviadilon, kiu pli forte tremis. Fabien sin sentis minacata de nevideblaj sinkoj. Li revis, ke li retroflugas, sed li ne turniĝis eĉ unu grado. [...]

Li ne plu sciis kiom da tempo, kiom da streboj lin liberigus el ĉi sombraj ligiloj. [...]

Li komencis diveni la strangan ofensivon, kiu de la kordilero Andoj, sin direktis al la maro. La ciklono atakos la urbojn antaŭ li povus ilin atingi. »



Kvankam ni prezentis nur la suban tekston, jen iu fikcio kiu estis verkita speciale por tiu nokto favore al la legado.

DUCENT SEKUNDOJ – FIKCIO pri TIMO fare de Frank Mintz

200 sekundoj

[Ĉi tio estas la necesa tempo inter Moskvo kaj Parizo por ke rusaj raketoj atingu sian ĝustan antifaŝistan celon]

Neniam ni bedaŭros nian decidon. Ni, ĉiuj oficiroj, ĉiuj generaloj, nome de nia devo por protekti nian popolon kiu loĝas kviete en grandaj teritorioj de Eŭropo, Oriento kaj Azio, nome, samtempe, de nia rolo por gvidi afrikajn-aziajn-latinamerikajn landojn ĝis ilia reala sendependado kaj ĝis ilia socialista libereco;

Ni la tuta stabo de la Rusia Federacio en Rostovo-ĉe-Dono ĵuras fini kaj piedpremi definitive la nazian haton kaj ĝiajn lakeojn en ambaŭ naŭzaj luliloj de Kievo kaj Le Mans.

150 sekundoj

Jen la unua lulilo, pro la perfida kreskanta rabio de nazismo kaj la freneza preteksto de fikcia sendependado imponita de Usono en Kievo, historia ĉefurbo de nia rusa regiono ekde la Mezepoko. Nun la eksterlandaj groteskaj marionetoj endanĝerigas nian patrimon. For de nia sankta rusa ukraina grundo!

Jen la dua lulilo, pro la ĝusta ĝemeligado inter Rostovo-ĉe-Dono kaj Le Mans ekde 1977, kaj la oportuna celebros de la 120 jaroj de la datreveno de la fondiĝo de la esperantista klubo en Rostov-ĉe-Dono, tiu evento iĝas la plej honta, trompiĝanta nesto de svarmantaj kalumnioj sur la ter-globo.

100 sekundoj

Tuĵe niaj raketoj, hodiaŭ la 15-an de aŭgusto de 2023, silentos tiujn fontojn de nekomprenebla malamo. Tiel malembarasante la homaron je tia neklarigebla hato, ni plenumas ambaŭ taskojn, detruante la plagon de la milito kontraŭ nia nacio-ŝirmilo de la paco, neniigante la alian plagon de la senĉesa stulta menso de agreso kontraŭ la saĝeco de nia registaro.

50 sekundoj

Tuĵe la falsanta etiko malaperos, la trankvileco regos hejme, Rusio trovos denove sian pravan vojon. Certe inter la loĝantaro en Kievo kaj Le Mans eble estis honestaj homoj, tamen la justeco estas pli grava ol la vivo de kelkaj homoj.

3 sekundoj

La stabo de la Rusia Federacio en Rostovo-ĉe-Dono salutas emocie la homaron ĉar nun nepras al ĝi vivi kaj pensi sane kaj serene.

LA HOMO KAJ LA MARO



*Libera homo, al vi eterne estos kara
La mar'. Ĝi vin spegulas. L'animon kun plezuro
Rigardas vi en ĝia senfina ondo-rulo;
Via spirit' ne estas abismo malpli amara.*

*Vi plonĝas en la sinon de l' spegulbildo plaĉe;
Vi ĝin brakumas brake, okule. Via koro
Sin savas kelkafoje de l' propra ve-rumoro
Per tiu bru' plendanta senbride kaj sovaĝe.*

*Vi ambaŭ estas same tenebraj kaj diskretaj.
Homo! Vin kiu sondis ĝis la abisma fundo?
Mar'! Kiu konas riĉojn intimajn de l' profundo?
Ja tre ĵaluze gardas vi ambaŭ pri l' sekretoj.*

*Kaj tamen, dum centjaroj sennombraj, vi per batoj
Kruelaj interluktas kun senkompata forto,
Ĉar tre amataj estas de vi la murd' kaj morto,
Eternaj batalantoj, vi senindulgaj fratoj!*

La Floroj de l'malbono, Charles Baudelaire

Traduko sub la redakto de Kalocsay kaj Waringhien-1957



Charles Baudelaire
1821 - 1867